# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT - MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)



Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX 55/3 Terrasse Rue du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasisto: S-ro G. VILLENEUVE 14, rue Clair de Lune 91530 SAINT-CHERON
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59800 LILLE
Peranto IKUE: S-ro M. COLLEU 95, rue Victor Hugo 80440 BOVES



C.C.P.: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 186 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== SEPTEMBRO 1995 ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++


N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## LE MOT DU PRESIDENT

Je voudrais en cette rentrée de l' automne 1995 vous entretenir de l' avenir de notre association. Vous lirez plus loin que nous changeons de trésorier et que le père Héroux nous quitte. C' est le signe avant-coureur de modifications que nous allons connaître dans les années à venir. D' ici la fin du siècle - c' est-à-dire dans moins de quatre ans - nous devrons petit à petit renouveler notre Comité Directeur, y compris le président.

Vos dirigeants vieillissent et, dans l' intérêt même de notre association, il est nécessaire qu' un sang neuf vienne apporter à notre mouvement un nouvel élan et un nouveau départ.

Il faut donc que chacun de vous en prenne conscience et se tienne prêt, quand l' occasion se présentera, à assurer la relève et à assumer les tâches que requiert l' avenir de notre association.

Ne craignez pas de nous apporter votre concours. Le service qui vous sera demandé est beaucoup moins compliqué que vous ne le craignez et vous n'aurez à y consacrer qu' un temps peu important.

Aussi je compte sur vous tous pour prendre en mains la direction de l' association au fur et à mesure qu' elle fera appel au dévouement de ses membres.

A. B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

En tiu aŭtuna relaboro de la jaro 1995, mi volus paroli al vi pri la estonto de nia asocio. Vi legos en ĉi tiu bulteno, ke ni havas novan kasiston,

../...

kaj ke P-ro Héroux forlasas nin. Tio estas antaŭsigno pri estontaj modifoj. Ĝis la fino de la jarcento - t.e. post malpli ol kvar jaroj - ni devos iom post iom renovigi la komitaton, inkluzive la prezidanton.

Viaj estraranoj maljuniĝas, kaj, por la bonfarto de nia asocio, necesas, ke nova sango alportu al nia movado novan elanon kaj novan ekiron.

Ĉiu el ni konsciiĝu pri tio kaj estu preta, kiam prezentiĝos la okazo, ŝanĝi la deĵoron kaj plenumi la taskojn necesajn al la pluvivo de nia asocio.

Ne hezitu alporti al ni vian helpon. La petita servo estas ja malpli komplika ol vi supozas kaj vi bezonos nur ioman tempon por ĝin plenumi.

Mi kalkulas pri vi por gvidi la asocion laŭmezure, kiam ĝi bezonos vian sindonon.

A.B.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## NI PREĜU KAJ MEDITU

Sinjoro, vi konas mian deziron:
sekvi vin kaj nur vin.
Tamen, mi daŭre emas
sekvi miajn proprajn idolojn,
miajn proprajn diojn...
Instigu min enigi miajn radikojn
ĉiam pli en vin,
por ke via vivo triumfu
el miaj sklavigoj,
el miaj eraroj kaj el miaj mortoj;
por ke via Potenco
manifestiĝu en mia vivo.

Mariette, animantino.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## NIA JARA KONGRESO

Nia asocio kongresis en la porpastra seminario en Limoges de la 19-a ĝis la 23-a de majo 1995. Dank' al la bonega preparo de S-ro Pons, la renkonto estis vera sukceso en amika etoso.

Du italaj samideanoj: D-ro Sola, prezidanto de la italaj katolikaj esperantistoj kaj S-ro Cappelo, ambaŭ el Vercelli, ĉeestis niajn aranĝojn kaj alportis iom da internacieco en niaj laboroj.

La kongrestemon pri paco kaj amikeco inter kristanoj kaj islamanoj bone pritraktis P-ro Bourdon. Poste vigla diskuto evidentigis la komplekson kaj malfacilecon de la rilatoj inter la du religioj.

Kanoniko de Montaigu, reprezentanto de M-ro Soulier, episkopo en Limoges kaj S-ro Guéguen, prezidanto de la Esp° grupo en Limoges, partoprenis nian tagmanĝon sabaton la 20-an de majo. Ambaŭ aprobis kaj kuraĝigis nian agadon.

Okaze de la dimanĉa diservo, oni kolektis 395 F, kiujn oni sendis al S-ino Jacob por helpi ŝin en ŝia agado por polaj esperantistaj geknaboj.

Riĉa programo de promenadoj kaj ekskursoj kondukis la kongresanojn en la malnovajn kvartalojn de Limoges, kie malnovaj preĝejoj vekis intereson. Sur la kamparo, la grupo vizitis la kortuŝan vilaĝon Oradour-sur-Glane, kie oni preĝis por fortigo de la paco inter homoj kaj nacioj, kaj la urbeton St-Junien kaj pliajn ĉarmajn lokojn.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## PRELEGO EN LIMOGES

Laŭ peto de S-ro Bouvier, profesoro, nia prezidanto prelegis en la liceo St-Jean pri la Internacia Lingvo.

Trideko da lernantoj de la 2-a klaso atente aŭskultis kaj montris intereson pri la problemo de la diverseco de la lingvoj, kaj ĝia solvo pere de Esperanto

Pluraj studentoj faris taŭgajn demandojn pri la Internacia Lingvo kaj ties lernado.

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo)

Kun franca pastro, veterano el la milito de 1870 kaj du pliaj homoj, tiu eta grupo envagoniĝas al Ayasuluk (Selçuk), kie oni opinias xxxxx saĝe dungi gvidanton (Mustapha) kaj lupreni ĉevalojn.

Intenca kromvojo kondukas niajn vojaĝantojn al la grekortodoksa monaĥejo de Degirmendere por peti kelkajn informojn pri la loko de la Ĉieliro.

- "Kie mortis la Theotokos (1)?" S-ro Jung demandas la monaĥojn.
- "En Jerusalemo", oni respondas.

Tiu monaĥejo restis fidela je la bizanca tradicio pri la Endormiĝo de la Virgulino, tradicio, kies malfruecon kaj senbazecon ni substrekis.

Elreviĝintaj, la esploristoj tranoktas la 28-an de julio 1891 en Kusadasi kaj decidas sekvi la indikojn de Katerina Emmerich.

La 29-an de julio, ĉirkaŭ la 11-a horo, post tre laciga paŝado, sekigitaj de senkompata suno, la serĉantoj atingas etan plataĵon, kie tri grekinoj kultivas tabakon. La soifegantoj petas de ili akvon:"Nero!Nero!" La virinoj petas pardonon:"Niaj kruĉoj estas malplenaj, sed vi trovos tie fonton, ĉe Monastiri, en Panagia Kapulu (Pordo de la Sanktulino)".

Kaj tiuj bonaj samarianinoj montras boskon. Niaj vojaĝantoj tien kuras. Fonto ilin atendis, elverŝante sian freŝan akvon ombre de antikva ruinaĵo, kiun enkadrigis ok belegaj platanoj.

Emocio kaptas la enketistojn. Ĝis nun, ĉio akordiĝas kun la precizigoj donitaj de la viziulino: la distanco el Efes, la situo rilate al la vojo al Jerusalemo, la eta plataĵo proksima al la domo kaj, krome, la nomo mem de la ruinaĵo. Restis lasta kontrolo: la panoramo malkovrota el la supro de la monto sur kies deklivo staris la domo. Plej alta rekompenco, el la montsupro, kiun ili rapide atingas, S-ro Jung kaj liaj akompanantoj ekvidas unuflanke Efeson, aliflanke la maron.

(1) Greka vorto signifanta "Dipatrino". Cirilo de Aleksandrio defendis tiun titolon en la Koncilio de Nicée en 431 kontraŭ Nestorius.

ooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## PROTOKOLO DE LA KONGRESAJ KUNVENOJ EN LIMOGES

I; <u>Ĝenerala kunveno</u>: 21-an de majo 1995

Prezidas S-ro Bessière, kiu legas la afablan salutleteron de la episkopo en Limoges kaj tiun de S-ro Colas, nia honorprezidanto.

Rezultoj de la balotado:
voĉdonoj: 43 validaj: 38
agadraporto: 35 aproboj, 3 sindetenoj
financa raporto: 37 aproboj, 1 sindeteno
renovigo de 1/3 de la komitato:

| | | | |
|---|---|---|---|
| S-ro COLLEU | 37 | Frato MARMOU | 36 |
| S-ro PONS | 38 | S-ro VILLENEUVE | 37 |

Ĉiuj estas elektita aŭ reelektitaj.

La ĝenerala kunveno decidas, ke oni kongresos nur ĉiun duan jaron. La venonta kongreso okazos en majo 1997 en La Houssaye-en-Brie (S & M).

II. <u>Komitatkunveno</u>: 22-an de majo

Ĉeestis: P-ro Bourdon, P-ro Héroux, F-to Marmou, F-ino Preux, S-roj Bessière, Despiney, Colleu kaj Pons.

Petis senkulpigon: S-ino Vincent, S-roj Colas kaj Villeneuve.

Konsisto de la nova komitato:
Prezidanto: S-ro Bessière
Vicprezidantoj: S-roj Lafargue kaj Pons
Sekretariino: F-ino Preux
Helpsekretario: S-ro Pons
Kasisto: S-ro Villeneuve
Helpkasisto: S-ro Colleu
Religiaj konsilantoj: P-roj Bourdon kaj Héroux
Membroj: F-to Marmou, S-ino Vincent kaj S-ro Despiney.

../...

Kunlabore kun S-ro Cousson, la komitatkunveno detale preparis la ekumenam diservon de la 2-a Eùropunia Kongreso. Tiu diservo okazis en la Pentekosta dimanĉo en la pariza preĝejo S-ta Petro de Montrouge. Proksimume 80 homoj ĝin partoprenis.

La venonta komitatkunveno okazos la 18-an de oktobro 1995 en la monaĥejo S-ta Jakobo en Paris.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## ŜANĜOJ EN LA ESTRARO

Kiel vi ĵus legis, S-ino Vincent, nia senlaca kasistino, transdonis sian oficon al S-ro Villeneuve; ŝi provizore daùrigas la redaktadon de la bulteno. Al nia kara Johanina, kiu dum jardekoj fortanime laboris por la asocio, ŝparante nek la sindonon, nek la tempon, nek la helpemon, ni esprimas nian koran kaj ŝuldoplenan dankon.

Pastro Héroux baldaù forlasos la sudon por reiri kiel misiisto en Bethlehem (Sud-Afriko). Ni deziras al li sukceson en lia agado kaj esperas, ke li komunikos sian entuziasmon por Esperanto kaj varbos multajn afrikajn samideanojn.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## REGULARO DE SANKTA BENEDIKTO

Ni do preparu niajn korojn kaj korpojn por batali sub la sankta obeemo al la diaj ordonoj; kaj se la naturo trovos en ni ion malpli eblan, ni preĝu la Sinjoron, ke li ordonu al Sia graco donaci al ni la helpon. Kaj, se ni volas eviti la punojn de la Geheno kaj atingi la eternan vivon, necesas, ke ni kuru kaj agu laù la maniero taùga por gajni la eternecon, dum ankoraù estas tempo por plenumi ĉiujn tiujn agojn per la lumo de ĉi tiu vivo, dum ni estas en tiu korpo.

Ni do formos ~~xxxxxxx~~ lernejon, kie ni lernos servi la Sinjoron, kaj kie ni esperas, ke ni starigos nenion trudan kaj pezan. Sed se io estas iom pli strikta pro la justeco, la elradikado de la malvirtoj kaj la konservado de la karitato, terurite vi ne tuj fuĝu la vojon de la savo, kies enirejo estas ĉiam malvasta. Ĉar per la progreso de nia fideleco kaj de la konvertado de niaj moroj, kun la koro dilatita per neeldirebla mildeco de amo, ni kuros sur la vojo de la diordonoj, tiel ke, neniam forlogiĝante de la instruo de tiu Majstro kaj persistante ĉe Lia doktrino en la monaĥejo ĝis la morto, ni partoprenu la suferojn de Kristo per la pacienco, por ke ni meritu partopreni Lian regnon.

Fino de la Prologo.

Trad. F-to Yves-Marie, el la abatejo de Kergonan

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## FONTO DE ETERNA JUNECO

<u>Rito tria</u>

Surgenuiĝu kaj rektigu la korpon. La manojn metu malantaùe, sur la femuroj. Klinu la kapon kun kolo antaùen; la mentonon tiru al la torako. Poste deklinu la kapon kaj korpon malantaùen, kiel eble plej malproksimen (enspiro). Revenu al komenca pozicio (elspiro).

<u>Rito kvara</u>

Eksidu sur planko kun rektigitaj gamboj; 25 cm inter la piedoj. Metu la manojn surplanke, ĉe gluteoj. Tiru la mentonon al torako. Poste deklinu la kapon malantaùen kaj samtempe levu la trunkon tiel, ke la genuoj estu fleksitaj kaj la brakoj rektaj. Streĉu ĉiujn muskolojn, malstreĉu ilin kaj revenu al komenca pozicio (elspiro). Levante la trunkon profunde enspiru.

<u>Rito kvina</u>

Apogu vin sur la manoj kaj piedfingroj; 60 cm inter la manoj, kaj inter la piedoj. Deklinu la kapon malantaùen. Poste fleksante la korpon supren en formo de inversa V, tiru la mentonon al la torako (enspiro). Revenu al komenca pozicio (elspiro).

La unuan semajnon ĉiutage ekzercu ĉiun riton trifoje. Dum la dua semajno kvinfoje, dum la tria sepfoje, ĝis 21 (post dek semajnoj). FINO

Antonina CIELECKA (el Monato)

## RESPONDOJ DE SANKTULOJ

La plej konataj estas tiuj de Johana d' Arc . Al juĝisto, kiu demandis ŝin:"Ĉu Sankta Miĥaelo estis nuda?" ŝi rebatis:"Ĉu vi opinias, ke Nia Sinjoro Jesuo Kristo ne havis per kio vesti lin?"

Pli,proksime al ni, amiko de la fama Padre Pio demandis lin, ĉu li vere aŭdis tion, kion diris al li lia gardanĝelo. Jen la respondo de Padre Pio:"Ĉu vi opinias, ke mi estas surda?"

Ĉiuj aŭdis pri Tereza Neumann. Kiel ĉiuj stigmatizitoj, ŝi estis hontinde atakita, ĉefe de teologoj. Oni akuzis ŝin pri ruzo. Skeptikulo suspektis, ke ŝi ricevis tiujn stigmatojn per memsugestio: "Vi tiom imagis al vi tiujn stigmatojn, ke ili fariĝis... - Sendube! respondis Tereza; imagu, viavice, ke vi dezirus havi kornojn, verŝajne ili kreskos al vi sur la kapo!"

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## PRI LA LITANIOJ AL LA SANKTA VIRGULINO

Ili estas unu el la plej respektindaj preĝoj pro siaj antikveco kaj diverseco. Sed ĉu ni bone komprenas ĉiun eron? Jen du klarigoj, kiujn mi trovis en malnova verko:

"VAS HONORABILE O.P.N."(honorinda vazo p.p.n.)

Kiu povus diri, kiajn honorojn meritas tiu plej valora vazo? La ora vazo kiu entenis unu mezuron da manao kuŝis en la Plejsanktejo, apud la kesto de interligo kaj la altaro de incensado, for de la profanaj rigardoj kaj de la maldiskretaj tuŝoj. Neniam ĝi forlasis tiun sanktan azilon, kie nur la pastroj rajtis alproksimiĝi al ĝi en iuj solenaj momentoj. Des pli profunda respekto devas ĉirkaŭi la plej altgrade elektitan vazon, tiun en kiun estis enverŝita la pleneco de la graco, la neesprimebla amo al niaj animoj, la Kristo filo de Dio! La anĝeloj adorkliniĝas antaŭ ĝi kaj la Plejpotenculo mem proponas ĝin al ilia kultado.

"TURRIS EBERNUA O.P.N."(ebura turo p.p.n.)

Ene de la ĉirkaŭa murego de la Davida kastelo estis turo pli eleganta kaj pli alta ol la aliaj: tiu, kiu portis la reĝan standardon. Ĝi estis konstruita per ŝtonoj blankaj, poluritaj kiel marmoro kaj sub la sunradioj ĝi aspektis kiel eburo. Al tio ĝi ŝuldas sian faman nomon.

Kun ĝi oni komparas Marian, pro ŝia graco, ŝia forto kaj ŝia pureco. Ŝi estas la rava retirejo, kie plezuriĝas la Reĝo. Kronas ŝin la signoj de Lia potenco, kaj ŝia senmakula brilo altiras ĉiujn omaĝojn. Ni direktu al ŝi la okulojn de nia animo kaj ni salutu, per la sentoj de la iamaj pilgrimantoj, la lokon kiun la Reĝo de la ĉielo elektis por sia ripozo sur la tero, petante ŝin akcepti nin kaj konservi nin en ĝi poreterne.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## INTERNACIA RENKONTO OKAZE DE LA JARO DE TOLEREMO

Ni, partoprenantoj de la Dua Interreligia Seminario Esperantista en Szombathely. (Hungario) inter la 13-a kaj la 17-a de aprilo 1995, apartenantaj al 9 nacioj kaj jenaj religioj kaj spiritaj movadoj: bahaismo, islamo, hinduismo, kalvinismo, katolikismo, kvakerismo, luteranismo, movado JEAN, protestantismo, taoismo,

atestas pri tio, ke dum nia kvartaga kunestado, ni sukcesis pli klare ekkoni la etikajn instruojn kaj praktikojn de ĉiu el ni.

Ni konkludas, ke, laŭ nia sperto, se fidelaj sekvantoj de religioj kunestas kun malfermitaj koroj, sen antaŭjuĝoj, kun akceptemo, ili povas ne nur toleri sed respekti unu la alian kaj en amo meditadi, preĝi kaj festi kune.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## INTER NI

M-ro Noyer, episkopo en Amiens, honoris nian amikon M. Colleu per la diocezmerita medalo, pro lia servo al la paroĥo en Beves. Tie okazis la ceremonio la 11-an de junio.

Novaj anoj 1995: 8) S-ro GUEGUEN (Hte-Vienne); 9) F-ino RIMASSON (Sarthe)

Gratulon al S-ro Colleu kaj bonvenon al la novuloj.

IKUE-membroj 1995: 24) F-ino HERVIER ; 25) S-ro VIGNAUD; 26) S-ino Le COQUIEC; 27) S-ino TOURTOIS; 28) S-ro BESSIERE.

INVITO:

La 7-a nordfranca belga Esp° rendevuo okazos la 4/5-ajn de novembro 1995 en Base de plein air nature Morbecque-le-Parc 59190 HAZEBROUCK.

Kursoj por komencantoj (F-ino Vennin), progresantoj (S-ino Noël), praktikantoj (F-ino Samain), spertuloj (S-ro Lagrange)

Prezo (aliĝo + plena pensiono): 225 F.

Informoj kaj aliĝoj: S-ro J. Dietrich 104, rue J. Jaurès 59192 BEUVRAGES Tel. 27 33 79 31. Limdato: 31-an de oktobro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

KOTIZTABELO 1995

| | |
|---|---|
| I.K.U.E. kum "Espero Katolika" | 140 F |
| Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 621 81 P. | |

-----------

| | |
|---|---|
| A.C.F.E. kum "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo | 40 F |
| geedza paro | 50 F |
| infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| bonfaranto | 200 F |

-----------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kum "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 280 F |
| U.E.A. kum "Esperanto" kaj Jarlibro | 300 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO

1. Le mot du président
2. La bileto de la prezidanto
Ni preĝu kaj meditu
Nia jara kongreso
3. La kristana oriento
Protokolo de la kongresaj kunvenoj
4. Ŝanĝoj en la estraro
Regularo de S-ta Benedikto
Fonto de eterna juneco
5. Respondoj de sanktuloj
Pri la litanioj al la S-ta Virgulino
Internacia renkonto
6. Invito

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 3ème trimestre 1995 !! Polycopié par l' A.C.F.E.(enregistrée le 6
!! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous
C.P.P.A.P. n° 62 532. !! le n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977)
Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin
Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
René-Jean MARMOU !! FRANCE